


SUDFRANCIA STELO

N° 195 - 4a kvaronjaro 2010 - 4^{er} trimestre 2010



**Bulteno eldonita de la
Esperanto-Federacio de
Langvedoko-Rusiljono**

Bonvolu sendi viajn informojn,
fotojn artikolojn, kaj novaĵojn al
Christian MOURE 15, rue du
Verdier 34120 TOURBES
(xianmoure@orange.fr)

BONAN NOVAN JARON

Pasken 2011 okazos Interasocia Renkontiĝo de Esperanto ĉe Mediteraneo (IREM 2011). En 2005 la diversaj francaj asocioj kunvenis en Boulogne-sur-Mer, ni invitis ilin en Sète. Loka Komitato (LOKO) preparis la alvenon de pluraj centoj de samideanoj, sed dum la diversaj programotagoj, ni bezonas helpon de ĉiuj por ke IREM estos samsukcesa kiel UK 1998 en Montpellier. Jam multaj federacioj partoprenas en LOKO kaj aliaj jam sinproponis. Ni dankas ĉiujn kaj invitas la aliajn partopreni kaj helpi. Vidu la retejon

<http://esperanto.sete2011.free.fr/irem.php?Lingvo=eo&Temo=Bonvenon>

Dum IREM, Katalin Kováts organizos sesion por trapasi ekzamenojn KER (laŭ Komuna Eŭropa Referenckadro) kiuj estas oficialaj ŝtataj diplomoj. Informoj: redaktanto@edukado.net.

Nia venonta federacia kunveno okazos post IREM, la 21a de majo en Béziers (MVA- Maison de la Vie Associative).

La unua numero de nia bulteno aperis en januaro 1961. De 50 jaroj, ĝi estas ligilo de la asocia vivo de nia federacio. En la venonta numero, ni raportos pli detale pri tio. Finjare ankaŭ pensu pagi vian abonon kaj kotizon (8€ por la bulteno kaj 2€ por la federacia kotizo).

Ni deziras al ĉiuj FELIĈAN JARON 2011

la estraro.

Por staĝo, invititaj de la esperantaj fervojistoj el Tuluzo, ni devis trovi ilin la sesan de septembro en unu el iliaj feriaj centroj. Sed tiu centro pro renovigo ne estis preta. Do, en alia loko, Boû-Silhen inter Lourdes kaj



Argeles-Gazos, tre bone akceptitaj ni estis. Kvazaŭe tri dek personoj. Inter tri proponitaj kursoj ni povis elekti : inicio, perfektigo kaj konversacio; la lastan mi partoprenis.

Ĉiumatene tre interesaj dinamikoj kaj riĉigan kurson ni ricevis.

Agrabla renkontiĝo

Iun pasintan vendredon, telefonas Claude Labetaa, kiu, kun sia edzino Véronique, okaze de travojaĝo en la regiono, dezirus renkonti membrojn de la montpeliera grupo. Kelkaj povas partopreni : Hélène, Rosy, kaj Jean.

Do, komence de posttagmezo, sesope ni sidas ĉirkaŭ tablo en kafejo de G. Lafayette, antaŭ trinkaĵoj, pretaj


Posttagmeze ĉu daŭrigi ĝin, ĉu ekskursi en tiu tre bela regiono ni povis fari. La plejmultoj elektis la lasteblecon. De Didier bonega kuiristo kaj poeto, preparitaj la komunaj manĝoj estis (remarkinde delician paeljon). Tre simpatia etoso... ankaŭ la vesperoj...

Sen forgesi Maïté, la edzino de Didier, kiu finsemajne proponis al ni produktojn el la regiono. Post la sugesto de niaj tiom fervoregaj fervojistaj amikoj venontjare fari denove alian staĝon ni disiĝis.

C. C. Colette Carbonnel

babili.

Ni ekscias, ke Claude estas prezidanto de la perigorda grupo, tre aktiva: li baldaŭ montros tion. Telefone, li anoncis, ke li venos peze ŝarĝita – fotaparato, komputilo kaj ... ĵus eldonita bildstrio.



Jen la komenciĝo de la aventuro: en 1990, por festi la 50an datrevenon de la malkovro, aperas franca bildstrio : " Le secret des bois de Lascaux". La verkistoj kaj samtempe eldonistoj (Dolmen): Thierry Félix

scenaristo kaj Philippe Bigotto
desegnisto, laborintaj kun la
partopreno de la kvar malkovrintoj
de la groto.

Kaj 2010 estas la tempo de la
esperanta versio, okaze de la 70a
datreveno.

Tio estas la laboro de la tuta
perigorda teamo (kursanoj kaj
gelnantoj) + lasta revizio de pola

**La 18an de decembro, naŭ
anoj de la nemoza klubo festis la
Zamenhofan tagon** en la sidejo de
la asocio.

Ĉiuj kunportis manĝaĵojn kaj
trinkaĵon: ni ne malsatis post la
kunveno. Bona etoso regis. Federiko
proponis kulturan ludon. Efektive,
ĉiu partopreninto devis diveni la
francan tradukon de esperantaj
esprimoj. Ne facila ludo. Ĉiu
komprenas la sencon sed ne havas

kaj hungara esperantistoj, indikitaj
de Renato Korsetti. Pro amikaj
rilatoj inter Claude kaj la verkistoj
de la franca teksto eblis uzi la
samajn kovrilon kaj prezon (13 €.)

Mi havis la okazon montri la
bildstrion dum kunvenoj de la
montpeliera grupo kaj de LoKo /
IREM Seto. Konkludo : tre interesa
kaj amika renkontiĝo ! Joana B.

saman tradukon, sufiĉe cerbuma
ludo.

Poste, Clémence kaj Benoît
Doutreleau ludis kelkajn bretonajn
kaj italajn melodiojn per gitaro, fluto
kaj akordiono: ili ravis nin. Ili
instriuis al ni kelkajn dancaĵojn kaj
ni provis danci.

Fine de la tagmanĝo, ni tre rapide
faris la moralan kaj finanĉan
raporton okaze de la ĝenerala
kunveno.

Dankon al ĉiuj partoprenintoj. F.B



RENKONTIĜO en M.V.A. por la klubo de Beziers.

La 04-12-2010, ni sukcesis havi malgrandan salonon por kuniĝi de la 12h ĝis la 17H. Tiel ni ne povis akcepti la tutajn samideanojn.



Kiel kutime

Fernande deklamis siajn 2 poemojn. Plie si prezentis filosofan sperton kun la helpo de Line, kiu teatrumis sian novan sketĉon kun Genevieve. Poste ni vojaĝis per la bildoj de

Monata kunveno la 20an de novembro 2010 en Montpeliero.

Hodiaŭ ni estis 16 geamikoj en la salono de la Ĉies Domo Escoutaire iom malfrue, certe pro aĉa vetero, nigraj nuboj forblovitaj de la vento invadis la ĉielon. Tio ne malpermesis agrablan kunvenon kaj varman etoson.

Vizitis nin paro De Wilde, esperantistoj kiujn mi konis antaŭ pluraj jaroj dum la internacia renkontiĝo organizita de la Barcelona Esperanta Asocio. Ili vizitis Serge kaj Monika en Montferrier, okaze de plukado de

Waclawa sur la insulo "La Réunion" kaj la lando Pollando kaj ankaŭ per

bildoj ni vizitis Moskovon, la transsiberian trajnon, la lagon Baikalo kaj la Mongolion kaj ĝia dezerto de Gobio. Lulu teatris sian monologon kaj kun ŝi ni kune

kantis "Rulu, rulu nun" originalan esperantan kanton de "Kayto".

Ni bone parolis, babilis per la internacia lingvo la tutan renkontiĝon. L. E.

olivoj kaj kompreneble ili partoprenis nian kunvenon.

Ankaŭ ĉeestis nova esperantistino **Mari-The** kiu laŭ mi komencis lerni la lingvon en Beziers, ni bonvenigas ŝin en nia granda familio kaj invitas ŝin kiam ŝi deziras veni, sed **nur se ŝi restos tagmanĝi kun ni!**

Same la unuan fojon ni vidis Martine-n en nia monata kunveno, ŝi jam konis Esperanton en Beziers, do ankaŭ al ŝi: Bonvenon!

La temoj ne mankis, ni iom parolis pri la IREM, pri nia biblioteko, bone zorgita de Monika, kiu nun entenas kelkajn 300 librojn.

Jeannine parolis pri Veronika kaj Claude Labetaa, perigurdina paro kiu vizitis Montpellier akompanata de kelkaj el niaj amikinoj. La bildstria libro pri la Groto Lascau pasis de mano en mano, ĝi restos en nia biblioteko.

La ĉefa afero de la tago estas: ke nia venonta monata kongreso, la 11an de decembro vidos la bezieranojn

Zamenhofa fest-tago la 11an de decembro 2010 en Montpeliero

Tiun jaron , en Beziers la salono kie okazas la kunvenoj ne estis libera, do la amikinoj de Beziers venis ĉe ni. Je la 10a matene, 3 biteraninoj estis jam tie: Line, Genevieve kaj Laurence. Multaj el Montpeliero senkulpiĝis aŭ pro malsano aŭ pro aliaj kialoj. Do ni estis 13 ĉirkaŭ la tablo por komenci tiun belan Zamenhofan fest-tagon. Nia Prezidanto Serge diris kelkajn vortojn pri la biblioteko kies libroj ne tro vojaĝas en la manoj de niaj geamikoj ! Laurence prezentis la librojn kiujn Veronika kunportis el Parizo: La Eta Princo.

Mi parolis pri 3 junaj gelernantoj, kiuj komencis lerni Esperanton en la Ĉies Domo "Escoutaire". Temas pri knabo 10 jara kaj du knabinoj 12 jaraĝaj. Mi renkontis ilin antaŭ la


partopreni ĝin, ni do atendas ilin senpacience.

Hodiaŭ, la prezidanto foriris tuj post la manĝo, do ni restis iom pli ol kutime, fine komenci la digeston de tro da manĝataj kukoj !!!!

Ĝis venonta monata kunveno !!!!

Ni esperas agrable festi la Zamenhofan Tagon ! J. B.

Disponible à la fédé : 8,40 €
(04 67 39 16 30)



kurso merkrede, kiam ili atendis la finon de la tago en la Centro kiu zorgas pri la infanoj ĉiujn merkredojn. Mi babilis kun ili kompreneble pri Esperanto. Ili ŝajne tre interesiĝis pri la afero, do mi konsilis al ili demandi klarigojn al la Direktorino de la Centro (Ŝi estas junulino kiu iom lernis Esperanton).



Momenton post la komenco de la kurso tiuj tri infanoj, la Direktorino kaj du aliaj junulinoj venis peti demandojn. La rezulto de tiuj demandoj estas, ke la tri infanoj (Mehdi, Melina kaj Kenza) decidis partopreni la kursojn. Antaŭ ĉio mi demandis la telefon-numeron de la gepatroj kaj telefonis al ili por scii ĉu ili akceptas ke la infanoj lernu la Internacian lingvon? La patrinoj ŝajne estis ravitaj, do, de jam tri foje la infanoj venas kun papero kaj kraĵonoj; ili lernis la alfabeton, ripetas frazojn, kaj jam konas: kio estas nomo, adjektivo, verbo, ktp... Por nia kurso kies partoprenantoj estas nur olduloj, ili estas freŝa vento kiu vigligas nin! Plie ili estas ĝentilaj kaj afablaj! Kion pli deziri? Post tiuj klarigoj, venis la momento komenci la distraĵojn: Line kaj Genevieve ludis skeĉon vestitaj per strangaj, belaj vestaĵoj kaj ĉapoj, ili

havis grandan sukceson, kiel kutime. Roza rakontis ŝercojn antaŭ ŝia foriro.

Poste venis la momento de la skeĉo ludata de Rozi, Maria kaj Serge, "La somnambulo". Necesas menci, ke la unuan fojon Rozi lernis parkere rolon sufiĉe longe, ŝi meritas apartajn gratulojn, la aliaj kompreneble ankaŭ estis longe aplaŭditaj!

Mi konfesas, ke en tiu momento mi multe pensis pri nia amiko Jorgo, kies ludado perfekte akordiĝis kun mi, amiko Jorgo ni tutkore salutas vin.

Kiam estis la 12a kaj duono, estis la horo de la aperitivo, la libroj, kajeroj, kraĵonoj malaperis el la tabloj, kaj en la daŭro de kelkaj minutoj boteloj, biskvitoj, glasoj aperis sur la tablo kiel magie!

Por la tagmanĝo ni estis nur 10 sed la varma etoso restis ĝis la fino de la tagmanĝo proksimume ĝis la tria.

Mi dankas nian amikon Johano Martineto kiu de kelkaj tempo partoprenas niajn kunvenojn. Ĉi foje ankaŭ ĉeestis mia bopatrino eĉ se ŝi ne lernos la lingvon, ŝi ege ŝatas la ideon de tiu INTERNACIECO kaj ŝi demandis ĉu ŝi rajtos reveni pliajn fojojn?

Jen raporteto pri nia Zamenhofa Tago.

Nun mi klarigos al vi, ke la bulteno de Avinjono parolis pri Sinjorino Humm, klera esperantistino, kiu troviĝas nun en maljunulejo, Rose Marie proponis sendi bildkartojn al Simone Humm antaŭ la fino de la jaro, tiel ŝi sentos sin ĉirkaŭata per la amo de la esperantistoj.

Ĉiuj partoprenantoj de la kurso Georges Brassens, subsribis

bildkarton de Salou, kiun mi havis de iun el niaj semajnoj de Barcelono, eĉ la infanoj subskribis.

Poste kiam mi parolis pri tio al mia bopatrino, ŝi serĉis belan bildkarton el Korsiko kaj je ŝia nomo mi sendis ĝin al Avinjono.

Nun antaŭ mia eniro en la kliniko la 3an de januaro, mi deziras al vi feliĉajn festojn kaj ĉefe sanon, feliĉon, monon por la Nova Jaro 2011 !!!
J.B.

Esperanta renkontiĝo dum rokfestivalo



En **Junio 2010**, mi partoprenis al mia unua Esperantista renkontiĝo, dum la **rokfestivalo en Roskilde**,



Danio.

La festivalorganizantoj proponis al 200 geesperantistoj labori trifoje dum 8 horoj kontraŭ senpagaj eniro, manĝaĵo kaj dormloko. Kvankam 40 personoj ne parolis Esperanton, mi povis konstati la efikecon de la lingvo. Sed mi uzis la



Anglan kiam debatoj tro animiĝis. Oni plene profitis de la muzikaj koncertoj kun grupoj kiel Muse, Prodigy, Pendulum, au Balkanaj orkestroj, ktp. Forirante kun grupeto, oni vizitis Kopenhagon, tre



multekostan urbon, oni sin banis, ludis kaj dancis. Estas katastrofo por dormi meze de la tendejoj (100 000 aliaj muzikamatoroj ĉeestis !) sed oni trovis senbruan herbaĵon proksime de lago (kun sovaĝaj fragoj por la matenamango :). Kaj

Le Caylar en novembro - decembro 2010 : efikaj ideoj por propagandi esperanton :

Le Caylar (Hérault), kun 425 enloĝantoj, situas ĉe la rando de la aŭtoŝoseo A75, inter Millau kaj Béziers. Unu enloĝanto estas la esperantisto Hubert Martin (laŭ li mem, komencanto). Li estas membro de komitato de Le Caylar kaj ĉirkaŭaj vilaĝoj, kiu organizas ĉiujare festmanĝon por la enloĝantoj, devenantaj el 9 diversaj landoj. Ĉiujfoje la temo de la manĝo estas unu el la 9 landoj.

Por la dekjara festo li proponis, ke la evento havu internacian etoson: "Larzako Festas Esperanton". Sabaton, la 27an de novembro, la programo proponis ekspozicion, prelegon, aperitivan, bufedon, muzikon.

oni laboris : oni havas recikladbudon. Personoj alportis al ni botelojn, kiun oni apartigis, kaj oni redonis monon kontraŭ tiuj boteloj. Kelkaj personoj ne venis por la muziko, sed kolektis botelojn dum la tuta evento por gajni monon.

Oni kuiris kaj fabrikis kion oni bezonis. Sed la memadministrado ne vere funkcias ĉar la samaj personoj faris ĉion. Finfine mi havas novajn geamikojn el pluraj landoj (kaj mi jam revidis unu el ili en Francio) kaj mi pliŝatis la ĝojan etoson de la grupo. Se mi povos, mi reiros tien sekvontan jaron.

Fabien Duchâteau

Sabaton, la 11an de decembro, Zamenhofa Tago estis planita kun koncerto de Jomo.

La 27an de novembro

Monique kaj Francis Bernard instalas ekspozicion kaj Francis legis argumentojn por konvinki la plimalpli tridek neesperantistajn ĉeestantojn eklerni esperanton. Li substrekis la multnombrajn kaj gravajn akcidentojn sekve de la lingvoproblemoj kaj la klopodon de la angla lingvo superregadi.

Mi persone konas tiun situacion en Belgio, la klopodon de la franca lingvo superregadi en la grandparte flandra Bruselo.

La scivolemaj aŭskultantoj petis informojn pri la historio de E^o kaj volis aŭdi E^o-frazojn. La legado de teksto el libro ŝajne ne plej taŭgis, pro tio mi rakontis en E^o kaj

Monique tradukis miajn spertojn, kiam mi vizitis la Bruselan E°-klubon. Tie mi eĉ ne povis konstati, kiu estas nederlanda- aŭ franca-parolanto. Do, tute ne eblas "krokodili", ĉar la membroj de la klubo venas de proksimume 15 diversaj nacioj !

Eblis ne nur konsulti la informpanelojn, sed ankaŭ kunporti la ĵus aperintajn kalendaretojn, eldonitajn de Jefo.

Poste Hubert prezentis en la franca kaj esperanta lingvoj la bele prezentitajn, diversajn kaj vere internaciajn manĝaĵojn.

Fine de la vespero Hubert invitis nin tranokti ĉe li, kiel gastiganto de "Pasporta Servo", same kiel ni. La sekvantan tagon ni kaptis la okazon

La soirée "espéranto" au Caylar du 27 novembre a commencé par l'installation de 25 panneaux et d'une grande banderole ESPERANTO dans la salle des fêtes. A 18 heures 30, la conférence sur l'espéranto par Francis et Monique BERNARD a été suivie par une quarantaine de personnes attentives et dont les nombreuses questions ont montré leur intérêt pour l'Espéranto. Puis a suivi le repas constitué d'une multitude de plats de différents pays réalisés par des membres de l'association "Larzac Village d'Europe" qui a organisé la soirée. Nous avons appris qu'il y avait des Roumains, des Espagnols, des Portugais, des Italiens, des Belges flamants, etc., tous Français !

viziti la belegan ĉirkaŭaĵon de Larzako, kovritan de neĝo.

La 11an de decembro : koncerto de Jomo .


Denove Hubert sukcesis altiri la intereson de 25 neesperantistoj.

Senprobleme entuziasmigis Jomo la aŭskultantojn per sia koncerto.

Konkludo : Bonaj ideoj povas veni eĉ de unuopa persono; subvencio de publikaj instancoj kiel en Le Caylar havas diversflanke pozitivan influon.

Bedaŭrinde mi konstatis, ke inter la ĉeestantoj mi ne vidis aliajn membrojn de la E°-kluboj de Béziers nek de Montpellier por subteni tiun laŭdindan iniciativon de Hubert Martin !

Arie Bouman – Portiragnes (34)



Chaque participant a trouvé sur la table, un petit calendrier d'"Espéranto-Jeunes".



Nous avons fait écouter une chanson de Brassens en espéranto par Jacques YVART et une chanson de JoMo pour préparer la soirée avec JoMo le 11 décembre 2010 au Caylar. La revue "ESPERANTO-info" de novembre-décembre a été distribuée à tous les participants. La BD sur la grotte de Lascaux a trouvé un acheteur. A la demande de la

LE CONCERT DE JOMO EPOUSTOUFLANT !



C'est ainsi que l'on peut qualifier le concert de JOMO, samedi soir, à la salle des fêtes du Caylar devant un

bibliothécaire du Caylar, nous avons laissé des livres en espéranto, des revues "ESPERANTO-info", les panneaux d'expositions qui seront présentés durant tout le mois de décembre. Nous remercions Monsieur Hubert MARTIN qui a organisé cette soirée avec son association...

La soirée Jomo s'est déroulée avec environ 30 personnes dont 7 espérantistes (4 venus de Lozère). Jomo a mis une ambiance du tonnerre comme d'habitude. Il a utilisé de nombreuses langues dont la langue d'Oc et bien sûr l'espéranto. Commencé à 21 heures et terminé après 11 heures sans arrêt, nous n'avons pas regretté le spectacle.

Francis et Monique BERNARD

public malheureusement trop peu nombreux, puisque seulement trente personnes étaient présentes. Malheureusement, parce que, comme les affiches l'annonçaient, JOMO est un artiste qu'il faut absolument découvrir. Sa prestation de l'autre soir a tout à fait confirmé notre intuition. Avec sa belle voix, ce chanteur polyglotte et musicien talentueux nous a entraînés dans un voyage de deux heures à travers les langues, les musiques et les chansons du monde, deux heures de spectacle sans un moment de répit pour lui, sans une seconde d'ennui

pour nous. JOMO a chanté en pas moins d'une douzaine de langues, faisant une présentation trilingue (français, espéranto, occitan) de chaque morceau et égrenant informations et anecdotes concernant les deux sujets, la chanson et les langues, pour lesquels il est une véritable encyclopédie vivante. Et tout cela sans jamais se prendre au sérieux, mais au contraire en maniant un humour irrésistible, se transformant en véritable homme-orchestre avec son "échantillonneur" - petit appareil électronique lui permettant d'enregistrer sur place et de repasser en boucle plusieurs bouts de musiques superposés - JOMO a mis une ambiance incroyable nous faisant participer et même, pour certaines, danser. Sautant d'un genre à l'autre avec une aisance surprenante (musique klezmer, chanson française, rock serbe, chœur russe, folk

américain, musique africaine, orientale, traditionnel occitan, créations personnelles en espéranto, et j'en passe), il nous a tous laissé pantois.

JOMO en août 2011.

Bref, ça nous a tellement plu - comme il gagne à être connu - que nous pensons le réinviter pour le Festival du Roc-Castel 2011, sans doute pour la soirée finale, notre fête des langues, ROC BABEL CAFé, le jeudi 4 août. Alors à vos agendas pour ne pas rater cette fois le "phénomène" JOMO !

Et merci à la Communauté de Communes et à Mathieu Dardé, son animateur culturel, qui nous ont permis d'utiliser la sono mise en place pour le lendemain pour le balèti de Coriandre. Merci enfin à Fred, le sonorisateur et "illuminateur" qui a su mettre en valeur le concert de Jomo. Hubert Martin

Kulture Esperanto-centro de Avijono proponis :

Programo de la 32a Zamenhofa tago Matene post babilema akcepto (kun kafo, teo, biskvitoj), Daniel Moirand prelegis pri "la mil kaj unu noktoj".

Distraj-posttagmezo

-La espero - ĥoro

-Prelego "pri lbertempo (Francis) El la Ĝoja Podio de R. Schwart

-Apud moskvaj vesperoj – kanzono

-Rakonto (Jeannine)

-Katjuŝa –kanzono

-La mitulo (Yvette) el la Ĝoja Podio de R. Schwart (parodio laŭ "Cyrano de Bergerac")

-Malgrand-ario de malgrandulino (Françoise kaj Michel)

-Tio, kio okazas, okazas –kanzono

-Vizaĝo de anĝelo (Hélène kaj Rose-Marie) (vidu la foton !)

Kiu estas la plej grava
(Denise, Hélène, Françoise,
Bernadette, Yvette, Jean kaj Henri)
fabelo el Kaŭkazio

-Pri la origino de l' kanzono (Jean-
Pierre) El la Ĝoja Podio de R.
Schwart

-Magali –kanzono

-"Sinjoro Badin" (Jeannine, Rose-
Marie kaj Bernadette) komedio de
Georges Courteline.

Ĉe rivero –kanzono

ĝis la revido !



SFS intervjuis Daniel Moirand



- **SFS** : Pourquoi avoir choisi "Les
Mille et Une Nuits" ?

- **DM** : Quand j'étais étudiant à
l'université d'Aix en Provence, j'ai
suivi les cours d'arabe classique
pendant plusieurs années. Ceci en
soi était déjà une approche du
monde arabe. De surcroît, l'un de

mes manuels d'études consistait en
une série de textes arabes destinés à
la traduction. Tous ces textes étaient
issus de diverses parties du livre *des
Mille et Une nuits*. Ces récits m'ont
laissé depuis cette époque lointaine
(un demi-siècle déjà !) une
impression ineffaçable : le
merveilleux y transparaît à chaque
pas et c'est précisément pour
retrouver (et faire partager) cet
élément que je me suis attelé à cette
traduction, longue, certes, mais
tellement passionnante !

- **SFS** : Par rapport à vos
traductions précédentes: "Le livre
des Merveilles" et "le Comte de
Monte-Cristo", avez-vous rencontré
des difficultés?

-**DM** : Il faut dire que la
traduction de l'original arabe faite
en français par Antoine Galland
au tout début du 18-e siècle est
d'une limpidité parfaite. Seules
quelques tournures ou expressions
inhérentes à la langue française de

cette époque, peuvent, à la rigueur, poser quelques problèmes techniques.

De plus, mes études de langue arabe m'avaient bien préparé à ce monde particulier. Par ailleurs, plusieurs années passées dans le monde oriental m'ont grandement aidé à saisir certains aspects spécifiques de la vie et des coutumes évoquées, et à en redonner l'essence dans la traduction en Esperanto.

La traduction *du Comte de Monte-Cristo* a été plus ardue en raison du caractère beaucoup plus littéraire du livre.

-SFS: *Y-a-t'il des spécificités d'une traduction à l'autre ?*

-DM : Il va de soi que chaque texte à traduire comporte des éléments spécifiques qu'il faut essayer de rendre dans la traduction. Ainsi, pour *Monte-Cristo*, il est certain que de nombreux termes de civilisation décrivent une réalité disparue à notre époque : il faut quand même essayer de les rendre au mieux sans trahir le texte.

- SFS : *Quelle traduction vous a posé le plus de problèmes ?*

-DM : Sans doute la traduction du livre de Marco Polo a été la plus délicate car il touche toute une série "de mondes" : monde turc, monde mongol, monde chinois, pour lesquels j'ai dû affiner mes connaissances. Mais comme mes études de langues m'avaient poussé dans ces trois directions, j'espère

quand même avoir pu rendre au mieux ces divers aspects orientaux. Il n'aura pas échappé au lecteur attentif que le livre *des Merveilles* fait le pendant au *Merveilleux* rencontré dans *les Mille et Une nuits*. Cet aspect "merveilleux" sous-tend les deux ouvrages dont j'ai assuré la traduction: l'enfant et son imaginaire ne perdent jamais leurs droits en dépit de l'âge !

-SFS: *Avez-vous pensé à une souscription, puisque votre traduction est finie depuis deux ans?*

-DM : Le système d'édition des livres en Esperanto n'a jamais fait appel, du moins à ma connaissance, au principe de la souscription. Dans l'ordre, il convient de suivre la démarche suivante:

- proposer un texte décemment écrit et présenté.

- faire relire et réviser le texte traduit (de préférence par un non-Français) de façon à éviter les gallicismes involontaires et incontournables. Dans le cas qui nous concerne, l'original comporte 1.200 pages, la traduction comporte six cahiers reliés de 100 pages (A4) chacun. Faut-il faire relire le tout à une seule personne, ou bien disperser ces six éléments entre six volontaires ?

- trouver un éditeur qui voudra bien investir (une somme non négligeable [j'ai les comptes de *Monte-Cristo*]) dans la publication de la traduction. Il ne faut pas oublier qu'un éditeur ne peut pas

travailler à perte, et que notre monde Espérantiste n'est pas très grand pour engendrer un tirage important.

Quand toutes ces conditions sont réunies, on peut lancer l'édition, en espérant que les ventes permettront à l'éditeur de rentrer dans ses frais et d'assurer un profit qui permettra à la Maison d'Édition de poursuivre sa tâche.

Le traducteur ou l'écrivain est souvent "rétribué" par un petit nombre d'exemplaires gratuits.

-SFS : *Quel autre projet voudriez-vous mener à terme ?*


-DM : J'ai déjà commencé la traduction d'un nouveau livre, épais

comme les autres, dont la lecture m'avait passionné il y a quelques années. Il s'agit du "*Manuscrit trouvé à Saragosse*". Ouvrage écrit en français par un Polonais voici plus de deux siècles (en 1804). Cet étrange livre mêle à la réalité historique des aventures rocambolesques, des fantômes, des visions, la kabbale ... Un régal! Peut-être plus tard, une incursion dans le monde de Jules Verne me tenterait (soit *20.000 lieues sous les mers*, soit *Voyage au centre de la terre*).


-SFS : *Dankon al vi Sinjoro Moirand*

<http://esperanto.sete2011.free.fr>

Notre logo évoque la rencontre de deux symboles différents qui représentent l'espéranto:

la traditionnelle étoile verte  et le **€** arrondi qui avec son

symétrique forme une image de globe  sous l'aspect d'un "ballon de rugby". Cette rencontre est aussi la rencontre de plusieurs



approches de l'espéranto qui ont divisé le mouvement espérantistes de façon tranchée il y a quelques décennies et qui maintenant ont trouvé les voies d'une coopération fructueuse.



La baleine est l'emblème de la ville de Sète dont le nom proviendrait du grec *ketos* ou du latin *cetus* qui signifient *baleine*, car, vu de la mer, le Mont Saint-Clair, au pied duquel se situe Sète -appelée aussi "l'île singulière"-, ressemble à une baleine.

Dum la mitologia epoko enŝovita en golfo de la Leono kuŝis golfeto, Golfo de Thau (To). En tiu loko urbo nomita Thau, iam stariĝis antaŭ ol droni kaŭze de Mediteraneondoj, ĉar Neptuno enviis ĝian fierecon.

Neptuno kuntiris la brovojn enpenetrigis sian tridenton en la marprofundojn, malmergis gigantan

Kelkaj setanoj

Roger Théron (Roĝe Teron)
(Seto 1925 - Pariso 2001)

Inter la famaj personoj naskiĝintaj en Seto, unu estas malmulte konata eĉ de la Setanoj mem. Mastro de "Paris Match" (Parizo Maĉ) dum pli ol kvardek jaroj Roger Théron (Roĝe Teron), kiu mortis la 23an de junio 2001, tamen li lasas spurojn en sia generacio. Nekredebla fotografia okulo, li montris eminentan ĵurnalistikan talenton kaj li konstituis artajn bildarojn kaj malnovajn kliŝojn inter la plej belaj en la mondo.

Robert Combas (Rober Komba)
unu el la kreintoj de la "figuration libre" (libra figureco)

Naskiĝinta dum la jaro 1957, li trapasis siajn infanecon kaj adoleskon en Seto.

figuration libre: tekniko sin turnas al ne tradiciaj kaj tre koloraj bildoj, kiu rilatas al kodo de la bildstrioj. Richard Di Rosa (Riŝar Di Roza) kaj

cetacon, kaj demetis ĝin komence de la golfeto, tiele ŝanĝita al lageto ekde nun ŝirmite kontraŭ la orientaj ventoj.

La cetaco, speco de baleno kun delfenobeko ŝtoniĝis surloke vidante la dion de la maro ; tiamaniere naskiĝis la monto Seto.

C.M.

Hervé Di Rosa (Erve Di Roza), François Boisrond (Fransoa Boiron) kaj Robert Combas estas la kreintoj. La artistoj de la libra figureco tra siajn verkojn prenas la liberecon esprimi ĉiujn artaj esprimmanieroj sen limo kultura ĝenro kaj de geografia deveno, sen valora hierarkio inter alta kaj malalta kulturo.

Hervé Di Rosa naskiĝis en Seto dum la jaro 1959. Li estas la kunfondinto kun sia frato Richard de la Muzeo Internacia de la Artoj Modestoj (MIAM) en Seto, kiui malfermis dum la jaro 2000.

Richard Di Rosa naskiĝinta en 1963 en Sète, estas franca skulptisto. li estis kun sia frato Hervé Di Rosa, Rémi Blanchard, François Boisrond kaj Robert Combas unu el la ĉefaj verkistoj de la franca movado : 'Figuration Libre', renoviĝo dum la jaroj 1980 de la pentrarto. Tiu malkompleksita pentrarto ofte

ĉerpas el la bildstrio, al la rokmuziko kal al la murdesegnaĵo. Li estas la sola membro de la movado, kiu elektis la skulpturon.

Gustave Thérond (Gustav Teron) naskiĝis dum la jaro 1866. Li studis en Montpeliero kaj li estis nomumita instruisto en Seto (lernejo

La kanalo dum la XXIa jarcento

Ekde la fino de la dudeka jarcento ĝi ofertas multajn agadojn ; ankaŭ ĝi permesas ŝipan transiton inter Atlantiko kaj Mediteraneo

Pri turismo kaj libertempoj

La kanalo pli kaj pli allogas riveran turismon pere de luŝipoj, restoracioj-ŝipoj, aŭ ankaŭ promenadŝipoj. Tiu ĉi turismo disvolviĝis ekde 1960 sub impulso de Britoj ĝis sia apogeo en 1980. Ĝi ebligas per si mem kvinonon de la rivera franca turismo kaj 80% da pasageroj estas fremduloj ĉefe germanoj, svisoj, britoj.

Vintre turisma navigado ĉesas sed oni profitas malbonan sezonon por prizorgi rivermaterialon.

Fiŝkaptado

Seto estas la unua franca fiŝkaptado-haveno en Mediterranée, plie fama pro sia moderna aŭkcio.

Ĝia fiŝkaptada ŝiparo entenis (2007) proksimume 185 ŝipojn (inter ili 17 tinusŝipojn kaj 36 trolŝipojn), ĝi

Arago) . Tre aktiva komunista militanto, li estis ankaŭ okcitanlingva verkisto, disĉiplo de la Avinjona skolo. Li verkis ‘elementoj de Langvedoka gramatiko (1900) langvedoka Seta dialekto, nur eldonita en 2002 de la Instituto de okcitanaj studadoj. Li mortis en Seto dum la jaro 1941. C.M.

Pri akvo

Dum seka sezono oni uzas la kanalon kiel akvorezervejon por agrikulturo. (700 irigaciadaj kluzpordetoj por 40 000 hektaroj da kulturitaj grundoj.) La kanalo ankaŭ ebligas provizon de trinkebla akvo dank’al uzinoj por akvtraktado.

La kanalo kiel heredaĵo.

Antaŭe oni rigardis la kanalon kiel rimedon por produktado, interŝanĝoj kaj komerco. Nuntempe oni konsideras ĝin kiel arkitekturan kaj teknikan heredaĵon.

La 7an de Decembro 1986 la kanalo kaj ĝia navigebla zono estis klasigitaj :’ Monda Kulturheredaĵo’ de la UNESCO.

Tio rapide instigas turisman plialtigon.

laboregis pli ol 800 maristojn kaj plurajn dekojn da vicentreprenadoj.

Tiu ŝiparo estas fiksada plencentran urbon inter la aŭkcio kaj la ponto de ‘la savonnerie’.

La trolŝipoj uzas fiŝretojn nomitajn ‘troloj’, kies maŝoj pli aŭ malpli larĝaj permesas diversajn kaptadojn

laŭ dikecoj de la fiŝoj; sardenoj, anĉovoj, skombroj, merlangoj, labrakoj ...la fiŝkaptado efektiviga 40 mejlojn for de marbordo, kio necesigas pli ol du horoj da navigado. La trolŝipoj eknavigas kia ajn estas la vetero.

La tinuskaptadon oni praktikas en golfo de Ĝenovo, Balearoj kaj afrikaj merbordoj. En la maro Mediteraneo la fiŝkaptado daŭras de marto ĝis decembro. Tiuj ŝipoj uzas tre antikvan reton nomitan seĵnon, kiu permesas kapti la tinusojn ĉirkaŭante ilin plenakve kaj akvosurface. La fiŝoj estas

Konkulokulturo

La baseno Thau (7000 ha) estas la plej vasta kaj la plej profunda el la langvedokaj lagoj apud Mediteraneo. Ĝi ofertas apartan zonon favoran al konkulokulturo: diversecon kaj abundon pri planktono, akvojn meze profundajn kaj varmajn.

Antaŭe mituloj kaj ostroj estis nur fiŝkaptaj produktoj. Kiam la naturaj rezervoj malfortiĝis homoj sin turnis al bredado de tiuj konkuloj.

1910, 1925 tiuj du datoj signas naskiĝon de la konkulokulturo.

1910 mitulkulturo

Ĉiu plenkreska mitulo ovellas 6 ĝis 12 milionojn da ovoj tre malgrandaj kiuj falas akvfunde kaj kiujn fekondigas virseksa spermo ĉeestanta en likva medio.

posttrenitaj vivaj ĝis stokadaj kaj bredadaj zonoj almare de hispanaj marbordoj.

La aŭkcio troviĝas apud enirado de la malnova haveno (kiu fariĝas nun plezurhaveno) apud kajo, kie oni elŝipigas la fiŝkaptadon. Meze de la jaro 1970 komputiloj, sur kies ekranoj enskibiĝas fiŝprezojn, anstataŭis la pasintempajn kiantojn. Ĉiutage oni vendas ĉi tie 1500 ĝis 3000 fiŝsortimentojn. La pogrande vendistoj sidiĝas en anfiteatro entenanta 100 numeritajn sidlokojn.

La spektaklo tiam komenciĝas... JD

Post kelkaj horoj eloviĝas minusklaj larvoj kapablas translokiĝi, post unu monato ili fiksiĝas. Jen la plieta krudmaterialo, nomita 'la grajno' de la bredistoj. La mitulkulturistoj ne uzas sovaĝan grajnon de la lago, ili preferas tiun de mara deveno pro plejbona kvalito.

-entubado en longaj retoj pendigitaj al stangoj kaj mergitaj. Iom post iom la retoj diseriĝas kaj formiĝas dikaj kaj densaj konkbuloj ligitaj unuj la aliajn.

-post 6 monatoj denove entubado en retoj dismaŝaj kaj pli solidaj

- post 2 monatoj en akvo la mituloj plidikiĝas; ili iĝas alkomercigeblaj post purigado por forigi parazitojn.

Parazitoj kaj predentoj de mituloj kaj ostroj

Krizofrisoj kaj angiloj avidas pri mituloj kaj ostroj sed la damaĝoj estas malgrandaj sed...

Litorinoj, aktinioj, ascidioj kaŭzas tre multajn

La konkilikolaj urboj de la Thau(a) lagbordo : Bouzigues (Buzig), Mézes (Mez), Marseillan (Marsejan) 1300 tonoj da ostroj ĉiujare estas bredadas en Bouzigues, t.e. 8,5 % de la monda produktado.

En la retrospegulo....

Aarhus : enkonduko

La jaro 1947 estis tiu de miaj dudekjaroj. Februare kaŭze de mia naskiĝotago, sinjoro Lentaigne, mia eksintruisto, kiu ekde 1937 okupis la vilaĝa posteno, faris al mi allogan proponon :

" Mi invitas vin akompani ni en Danujon, kie okazos esperanta kongreso se tio plaĉas al vi. Vi konas kelkajn regionajn samideanojn kaj ankaŭ aliajn de la pariza regiono, kiuj kuniĝis ĉi tie la du pasintaj someroj."

Danujo, la lando de Andersen, malproksime norda lando !

Tiun epokon malofte oni vojaĝis alilande. Krome kvar teruraj militaj jaroj kondamnis nin al izoleco kaj mallibereco.

Vojaĝo Parizo al Aarhus ekde la 30 de julio ĝis la 12 de aŭgusto 1947

(20a kongreso de SAT, Danujo : 662 partoprenantoj)

Foriro. La rendevuo estas difinita: "Placo de la Respubliko" je la sepa. Longtempe antaŭ fiksita horo multaj

Nutra valoro de ostroj

Fonto de proteinoj 18%

(kiel viando)

Malmulte da lipidoj

Neniu glucido

Riĉeco pri kalcio

Riĉeco pri oligo-elementoj kaj

vitamino D JD

Mi ne kredis al miaj oreloj! reva aventuro!

Miaj gepatroj akceptis ; mi estis kiel eble plej feliĉa!

La kongreso en Aarhus estis la 20^{an} SAT kongreso, la unua postmilita kongreso. La 19an okazis en 1939 en la sama lando sed en Kopenhago. El la foririnta grupo iu kolegino de la geLentaigne notis por si mem multajn interesajn detalojn, incidentojn, plezurmomantojn, kuriozaĵojn, etoson, kiujn ni spertis dum la vojaĝo kaj la restado en Aarhus.

Tiujn skribaĵojn mi ignoris sed iutage, post sesdek du jaroj, kelkaj el ili trafis al miaj manoj.

Tiam nia esperantista grupeto bonvole tradukis esperanten tiujn paĝojn rememorplenajn.

sakoj, valizoj ĉiuj formaj kaj koloraj amasiĝas proksime de 'Magasins Réunis'. Apud ili la partoprenantoj distingeblaj pro sia sporta vesto, sia verda stelo, sia lingvaĵo. Pasintjaraj gekamaradoj retrovas sin ĝoje. Korajn manpremojn oni interŝanĝas, alparoloj ŝprucas devigante

pasantojn sin turni. "Fremduloj, kiuj vizitas Parizon" flustras ili kaj ili pasas. Tamen la tempo fluas kaj la busoj tiel atenditaj ne ĉeestas. Iu malpacienco ekmanifestiĝas. Sed! ne plu timu, jen ili alvenas! Ili ne estas freŝnovaj busoj tute ne! Simplaj busetoj tre kvietminaj, kiuj neniam trorapidigos sed, kiuj kondukos nin tre trankvile kaj sekure ĝis fine de nia mirinda vojaĝo! Ek, antaŭen! Oni surmetas la pakaĵojn, oni malfaldas la banderolon: "Paris-Aarhus". Oni glutas verdajn stelojn. La busoj tute pretaj regule ornamitaj ekiras. Ĝis revido, Parizo! Konversacioj ek komencas sed per nevertigita konsento ni jam estas transirintaj la limon kaj ni estas en Esperantujo. Atentu pri vi novbakitaj uloj! Multaj malfacilaĵoj ekaperas. Tre ofte la vorto ne alvenas "eu eu". Iu spertulo afable rapidas helpi nin. La frazo iĝas ekvilibra kaj komprenebla. Nia bela vojaĝo komenciĝas. Laŭvice antaŭ niaj okuloj defilas la pariza antaŭurbo tiel vivplena, la valo de la Marno tiel koketa kun siaj grandaj urboj: Meaux, Château-Thierry. Ni atingas Reims. "Halto! Tagmanĝo! Sed, atentu, ni malfruas du horojn" (Ĉiam okazos dum la tuta vojaĝo). Tre ege rapida manĝo: iuj sidas, iuj staras kaj post dudek minutoj ĉiu retrovas sian lokon. La granda kampanja ebenaĵo disvolviĝas interrompita de kelkaj arbaretoj. Rethel la kriplita, Sedan riĉa je historiaj rememoroj.

"Pretigu viajn pasportojn". Kun iom da emocio tiuj, kiuj neniam transpasis la landlimon (el kiuj mi estas) mantenas tiun "Cezamo malfermiĝu". Mono : granda debato. Laŭ la regularo oni devas kunporti nur kvar mil francajn Frankojn sed atentu, revenante oni devos denove montri tiujn kvar mil frankojn. Jen estas la deviga haltigo! Domoj similaj aj la aliaj, transversa fosto, kiu baras la vojon: la landlimo. Rapidaj proceduroj. La fosto leviĝas. La buso eniras la "nenieslandon". La kakkaj uniformoj de la belaj doganistoj aperas. Ni eniras Belgion. La landlimo ne ŝanĝas pejzaĝon. Ni veturas en la Ardenoj belgaj, kiuj tute similas al la Ardenoj, kiujn ni ĵus forlasis. Samaj grandaj arbaroj. Ŝajnas al ni esti ĉiam en nia lando. Ĉio estas skribite en la franca. Alvenas la nokto kaj ankaŭ malproksima estas etapo. Fore jen lumoj. Ni alproksimiĝas al industria urbo: Lieĝo. Vendejoj brile lumigitaj, montrofenestroj abunde garnitaj. Okuloj brilas antaŭ alogaj kukoj, sed senkompate la buso daŭrigas sian iradon. Ni manĝetas kilometrojn kaj stop! Jen landlimo. Dum atentado, invado de eta Belga trinkejo. Imagu pri tiel libera aĉetado de ĉokolado! Fulmtuje la montrofenestroj estas malprovizitaj! Francoj pasis tien!

Ni glutas grandan tason da lakto kaj ek al la venonta haltejo je 50 metroj poste, antaŭ la nederlanda doganejo. Ni scivoleme observas la blazonojn

kun la moto: "Ni ferme tenos". Cetere ni retrovos multnombrajn francajn vortojn en la nederlanda-dana vortrezoro. La malfacilaĵoj ekaperas. Oni ne plu parolas saman lingvon. Instinkte ni parolas esperante pensante, ke oni komprenos nin. Ve! Ni ankoraŭ estas tro malmutaj. Ĝio iĝas glate. La fosto leviĝas kaj jen ni antaŭeniras sur la nederlandaj vojoj. Noktmeze. Okulo peziĝas, la kapoj luletiĝas, la dormo invadas la buson. Subita haltigo. "jen ili estas!" Ekaperante en la nokto nederlandaj esperantistoj ĉirkaŭas nian buson. Jam de tri horoj tie ili estas atendente nian alvenon. Ĉesas la dormo! La unua kontakto kun niaj fremdaj kamaradoj estiĝas. La novaj esperantistoj estas ravitaj. Ili parolas kaj ili estas komprenitaj. Senforĝesita momento! Post kelkaj bonvenaj vortoj la loĝbiletoj estas disdonitaj. Ek al la loĝejo! La valizoj pezas dum la transportado tra la dormantaj stratoj. Tiu karavano, kiu malgrandiĝas antaŭ ĉiu pordo estas tre pitoreska. Fine ĉiuj estas loĝitaj. Jen la dua matene tamen la foriro okazos je la sesa. Ni loĝas ĉe minaj laboristoj. Kia pureco! Kaj komforto, kiu aspektus kvazaŭ lukso en Francio: tapiŝoj, kusenoj, koketaj mebloj. Niaj gastigantoj diligentas servi al ni bonegan kafon. SED, ili parolas nek France nek esperante. Kiu komuna lingvo permesos nian interkomprenadon? Nenia dubo. Ni uzu miljarajn gestojn kaj la spektaklo de 6 surdaj-mutaj

montriĝas iom komika. Ĉio kun afablaj ridetoj ambaŭflanke. Je la 5a matene vekigo kaj nutra matenmanĝo. Sur la tablo kuŝas multaj bonaĵoj: konfitaĵo, butero, kukoj, seka kolbasso, fromaĝo, ktp... Jen la sesa matene, foriro kaj komenciĝas rava trairado tra Nederlando sud-norden. Vera kolora filmo disvolviĝas antaŭ niaj okuloj. Ni ne dormas. Pluraj oh! Ha! admiraj: iu ventmulejo, iuj kanaloj. Kaj tiuj domoj form- kaj kolor-variaj. Ili identiĝas per sia purigeo. La virinoj estas sentemaj al la pureco de la vitro. Demando: kiel ili faras? Oni preskaŭ haltigus la aŭtobuson por peti la recepton. Kvanto da florpotoj interne kaj eksterne ornamas la fenestrojn. La vasta verda ebenaĵo etendiĝas ĝis horizonto sed kreas neniun monotonecon. La domoj kun siaj klinitaj tegmentoj kun siaj larĝaj fenestroj, kun siaj brilaj koloroj plezurigas niajn okulojn. Laŭ la nacia vojo ni rimarkas biciklojn tre uzitajn, kiuj tute ne similas al la niaj. Nigraj kun tre alta stirilo ebligas la biciklistojn veturi ne kurbe sed tre rekte precize kvazaŭ ili sidus en fotelo. Nia miro kreskas dum ni trairas tiujn urbojn tiel purajn, tiel netajn kun florkorboj je ĉiuj vojkrucoj. Kelkaj stratoj vekas historiajn memoraĵojn: Nimègue, Arnheim, en kiu okazis sovaĝaj bataloj inter anglaj paraŝutistoj kaj germanaj soldatoj. La milito, la kruela lukto pasis tie...